WIKIPEDIA

Rumana lingvo

La **rumana lingvo** (rumane: *română* /ro'mɨnə/) estas latinida lingvo en la orienta Eŭropo, parolata de 24 ĝis 28 milionoj da homoj, precipe en Rumanio kaj Moldavio. Ĝi najbaras al la ukraina, bulgara, serba kaj hungara lingvoj kaj apartenas al la orientlatinidaj lingvoj sen plurala -s. Ĝi havas oficialan validon en Rumanio, Moldavio kaj en provinco aŭtonoma de Serbio, Vojvodino.

Rumanparolantoj estas disĵetaj trans multaj aliaj landoj, nome Italio, Hispanio, Rusio, Ukrainio, Israelo, Portugalio, Unuiĝinta Reĝlando, Usono, Kanado, Francio kaj Germanio.

Enhavo

Specialaj literoj

Gramatiko

La rumana en Moldavio

Eksteraj ligiloj

Literaturo

Referencoj

Specialaj literoj

Ekde 1860 la rumana lingvo estas skribata per latina alfabeto. Ankaŭ en Moldavio ĝi estas oficiala, sed oni uzas ankaŭ la cirilan alfabeton.

rumana

română

Parolata en	Rumanio kaj Moldavio, proksimume 2.500.000 en Germanio, Usono, Ukrainio, Bulgario, Hungario, Rusio, Kanado kaj aliaj landoj
Parolantoj	24 000 000
Denaskaj parolantoj	proksimume 24.000.000
Skribo	latina, kun kelkaj specialaj literoj

Lingvistika klasifiko

Hindeŭropa lingvaro

Italika lingvaro

Latinida lingvaro

Balkanlatinida lingvaro

Rumana lingvo

Oficiala statuso

Oficiala lingvo en	Rumanio, Moldavio, Vojvodino (Serbio)
Reguligita de	Rumana Akademio

Lingvaj kodoj

Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	ro
ISO 639-2	rum, ron
ISO 639-3	ron
SIL	RUM
Glottolog	roma1327
Angla nomo	Romanian

Litero	Prononco
a	/a/
ă	/ə/
â, î	/ɨ/
b	/b/
c	/k/ antaŭ *a*, *o* kaj *u*
	/ʧ/ antaŭ *i* kaj *e*
ch	/k/ antaŭ *i* kaj *e*
d	/d/
e	/e/
f	/f/
g	/g/ antaŭ *a*, *o* kaj *u*
	/ʤ/ antaŭ *i* kaj *e*
gh	/g/ antaŭ *i* kaj *e*
h	/h/
i	/i/
j	/ʒ/
k	/k/
l	/l/
m	/m/
n	/n/
o	/o/
p	/p/
r	/r/
s	/s/
ș	/ʃ/
t	/t/
ț	/ʦ/
u	/u/
v	/v/
x	/ks/ aŭ /gz/
z	/z/

Franca nomo	roumain
	Vikipedio

Specimeno

La Patro Nia

Tatăl nostru Care ești în ceruri,
sfințească-se numele Tău;
vie împărăția Ta,
facă-se voia Ta;
precum în cer, așa și pe pământ.
Pâinea noastră cea de toate zilele,
dă-ne-o nouă azi,
și ne iartă nouă greșelile noastre
precum și noi iertăm greșiților noștri
și nu ne duce pe noi în ispită,
ci ne mântuiește de cel rău.

La subsigno en la rumanaj literoj *ţ* kaj *ş* aspektas propre komo, ne cedilo kiel en la turka *ţ* kaj *ş* aŭ la franca *ç*. Dum la tempo, kiam plenaj signaroj de Unikodo ne estis vaste uzeblaj en komputiloj, kaj ofte ankoraŭ nun, oni uzas anstataŭe la literojn *ţ* kaj *ş*.

Gramatiko

Malgraŭ sia latinida deveno la rumana lingvo alprenis ne nur vortojn, sed ankaŭ gramatikaĵojn de najbaraj lingvoj. Ekzemple la konstruo de la difina artikolo (sufikse al substantivoj) kaj de certaj verboformoj kun "să" estas analogaj al la bulgara lingvo. Ĝia konjugacio similas al la latina kaj itala. Krome ĝi retenis la kazojn: nominativo, genitivo, dativo, akuzativo kaj eĉ havas vokativon. La substantivoj tamen havas identajn formojn por nominativo kaj akuzativo (ne-fleksia kazo) kaj por genitivo kaj dativo (fleksia kazo).

La rumana en Moldavio

En la rumana de Moldavio, de la moldavoj ofte nomata la moldava lingvo, oni arbitre anstataŭigis latindevenajn vortojn per slavaj. Ekzemple *popor* (popolo) iĝis *norod* kaj *pâine* (pano) iĝis *hleb*.[1]

La letero de Neacșu estas la plej malnova dokumento en la rumana lingvo



Ekzemplo de la rumana en cirila alfabeto

Mapo de la ĉefaj dialektoj parolataj en Rumanio

Eksteraj ligiloj

- Vortareto Esperanto-Rumana (http://satesperanto.org/VORTARETO-Esperanto-Rumana.html)
- http://www.easyromanian.com, kurso pri la rumana
- http://dexonline.ro, vortaro kun klarigoj
- http://www.webdex.ro, vortaro kun klarigoj web 2.0
- http://ro.wikipedia.org, la rumana Vikipedio
- http://mo.wikipedia.org, la moldova Vikipedio (ne plu flegata)

Literaturo

Monato, internacia magazino sendependa, numero 1996/11, paĝo 11: *La rumana* verkita de Ionel Oneț.

Referencoj

1. ↑ *Monato*, internacia magazino sendependa, numero 1996/11, paĝo 11: *La rumana* verkita de Ionel Oneț.

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Rumana_lingvo&oldid=6773089"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 12:58, 30 okt. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.